

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-RO 508

FEBRUARO 1948

NONI KAJ MANI

De JÓN SVENSSON

Esperanto-traduko de Paul van den Hövel

La verko rakontas pri la spertoj de du malgrandaj Islandaj knaboj, kiuj veturas per remboato kaj perdiĝas ie sur la vasta maro. Ĝi estas kredeble destinita por junuloj ; povas esti, ke en sia Esperanto-traduko NONI KAJ MANI taŭgas ankaŭ kiel facila legaĵo por plenaĝaj lernantoj finintaj elementan kurson.

Bele presita sur bonega papero. 160 paĝoj. Ilustrita.

Broŝurita 2ŝ. 6p., afranko 3p. (11 rpk.)

Bindita 3ŝ. 6p., afranko 3p. (15 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

**Ni bedaŭras ke ni ne povas akcepti mendojn el landoj de kie oni ne povas sendi pagon
(aŭ rpk.) al ni.**

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉu vi iros al Malmö ? Se jes, vojaĝu iom pli frue por ĉeesti la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingør (Elsinoro), Danlando, nur 3 horojn de Malmö. Kurstempo : 17-24 kaj 24-31 je julio. Tie vi ekhavos bonegan lingvan ekzercon antaŭ la kongreso. Prospekto havebla ĉe S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Ne forĵetu viajn kolektojn da poŝtkartoj. Vendu aŭ interŝanĝu ilin ĉe Georges Naudet, 26 rue Richebois, Fontenay-sous-Bois, près Paris, Francujo.

Franco, 40-jara, deziras korespondi kun Anglo, por reciproka plibonigo de Franca kaj Angla lingvoj. Skribu al : Marcel Legoux, 26 Rue Bourdarie Lefure, Asnières (Seine), Francujo.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

14 junaj geknaboj deziras korespondi kun gejunuloj ĉiulandaj. Respondo certa kaj senprokrasta. Adreso : Kursestro Jan Andrzejczak, Wrzesnienska 82 m. 16, Łódź, Pollando.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustritajn S-ro Eamonn Rothery, Woodside, Sandyford (Co. Dublin), Irlando.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Miroslav Kierkus, Nowa 6, Pabianice, Pollando deziras korespondadi pri ĉiuj temoj tutmonde.

Miroslav Predmojski deziras korespondi kaj interŝanĝi vidajkartojn, gazetojn, tutmonde. Kościelna 12, Pabianice, Pollando.

18-jara studento deziras korespondadi kaj interŝanĝi vidajkartojn, gazetojn. Leszek Jasinski, 7 listopada 42, Pabianice, Pollando.

Argentino, Buenos Aires (8), Amalia 347 (Liniers), S-ro Giordano Bruno López, p.m. k.ĉ.l., kvanto kaj valoro reciprokaj. Certe respondos.

S-ino Halina Denenfeld (fraŭlina nomo Domanska) str. Kopernika 12, Pruszcz—Gdanski, Pollando, petas ĉiujn siajn malnovajn geamikojn kiuj vivas kaj memoras pri ŝi, ke ili bonvolu skribi.

Poŝtkartkunvenon aranĝos Manchester Esperantistoj la 29an de Majo. Al ĉiuj, krom ĉenleteroj, respondo garantiata. Bonvole sendu viajn salutkartojn al F-ino Larrad, 9 East Avenue, Burnage, Manchester 19, Anglujo.

S-ro Raymond Clément, 11 Rue Bouret, Paris XIX, Francujo, deziras korespondi tutmonde, per poŝtkartoj aŭ leteroj, precipe kun aziaj, sudafrikaj, aŭ amerikaj landoj.

Radioamatoroj ! F8QA esperantiĝas. Voku lin prefere sur 80 metroj, merkrede ekde 20 GMT.

Brita oficiro serĉas postenon en Japanujo. Parolas hindustanan, germanan, kaj francan lingvojn. Korespondas hispane, itale. Stenografias angle. Lieŭt. A. J. Cameron, National Bank of Scotland, Inverness, Skotlando.

Georgo Hrotkó, Jósika u. 112, Pesterzsébet, Hungarujo, 40-jara fraŭlo, seruristo, koresp. kun ĉ. l. Al ĉiu respondos.

Ni deziras kontakti firmon kiu fabrikas flekseblajn metalajn tubojn por gaso, interna diametro 8mm., por importado. Bonvolu sendi prezojn kaj specimenojn al Wm. Briggs & Co., Scotia Mills, Derby, Anglujo.

Juna Esperantistino deziras korespondon kun la tuta mondo. Mi interŝanĝas librojn, fotojn, ilustritajn poŝtkartojn speciale de Usono. Certe respondos. Skribu al Else Mattern, Liesborn Krs. Beckum, Dorfstr. 29, Germanujo.

Carpentistoj tutmondaj. Mi deziras interŝanĝi leterojn kun alilandaj agemaj lignaĵistoj pri laboro kaj vivkondiĉoj en iliaj landoj. Bonvolu skribi al S-ro Albert Moody, 37 Upper Tooting Road, Tooting, London, S.W.17, Anglujo.

Ligo por Mondpaco urĝe propagandistojn petatajn ; Konijnenperken 107, Boschvoorde, Belgujo.

Petu se eble dokumentite "Esperantistan Turistan Kronikon" en Belga Radio. Sendu dokumentaĵon rilate modernan teatron. Adreso : Robert Loeckx, Turisma Informejo, Konijnenperken 107, Boschvoorde, Belgujo. Premio garantiata. Aŭfranku filatele.

Volapuk Journal. Reklamanto ĝojus kontakti iun kiu posedas ekzempleron de *Volapuk Journal*, eldonita en 1888 de Carrs, Paternoster Square, Londono. Skribu : H.S., 139 Newlands Park, Sydenham, London, Anglujo.

Profesoro prelegas Esperantlingve eksterlande malmultekoste dum Marto, Julio, Aŭgusto. Servo por interŝanĝo de turistoj. Turisma Esperanto-Centro, Konijnenperken 107, Boschvoorde, Belgujo.

Pli ol 50 gekursanoj, diversmetiaj, deziras korespondi k. ĉ. l. Respondo garantiata. Lernejestro Frant. Horčíčko, Záhlostice ĉe Litoměřice, Ĉeĥoslovakujo.

Por 25 kursanoj mi serĉas korespondantojn el la tuta mondo. L. Kynčl, floristo, Praha VIII, Palmovka, Ĉeĥoslovakujo.

70 studentinoj de komerca lernejo, 18-22-jaraj, deziras korespondi kun gejunuloj en la tuta mondo. Skribu al la kursgvidanto : Richard Levin, 55 Avenue Félix Faure, Lyon, Francujo.

Esperanta Unio de Liberalaj Religianoj deziras interrilati kun Modernistoj, Unitarianoj, kaj Liberalaj Kristanoj. Informo havebla ĉe S-ro W. E. Reeve, 32 Hillcourt Road, London, S.E.22, Anglujo.

Karlo Podenas, Litova militrezistanto, serĉas siajn antaŭmilitajn korespondantojn, kaj ankaŭ novajn. D.P.-Camp Lith., Dornstadt, Ulm, Germanujo.

Fr. Svačina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj : (1) Bredado de senkornaj kaprinoj laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo ĝis renaskiĝo, ne nur ĝis morto.

Kun tuta mondo volas korespondi Jaroslav Pavlis, studento, Svatojanská 587, Pardubice, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj F. G. Tuck, West Walls House, Wareham, Dorset, Anglujo.

Mi deziras korespondi pri Teozofio. S-ino Eugenia Vasconcellos, Caixa Postal 5.888, S. Paulo, Brazilo.

Fakuloj kaj interesatoj pri alkohol- kaj konserv-produktaĵoj ! Intencas korespondi kun la tuta mondo, certe respondos, Miklós Lengyel, Baross u. 57, Budapest VIII, Hungarujo.

Pastro Antono Lantos-Kiss, Ujkigyós, Békés m., Hungarujo, deziras korespondi kun ĉiulandaj pedagogoj kaj verkistoj.

Kiu sendos al mi 50 uzitajn poŝtmarkojn de sia lando ricevos la saman kvanton da Pollandaj. Subkolonelo doktoro Stanislaw Bober, Krakowska 45, Warszawa (21) Okecie, Pollando.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARO Februaro 1948

N-ro 508 (2)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :

H. HODLER

Redaktoro :

HANS JAKOB

Helpredaktoro :

MASON STUTTARD

Cion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Cion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth

Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅓ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

LA GERMANA PROBLEMO

En la Novembra numero de ESPERANTO ni skizis sub rubriko *Esperantistaj Problemoj* la situacion de nia movado rilate al la Germana problemo. Intertempe alvenis aro da respondoj el rondoj rekte interesataj.

De Pola kaj de Juda flanko la sinteno estas neta. Citante la miljaran antagonismon germano-polon (germano-slavan), nia Pola samideano vidas la savon de la mondo—aŭ minimume de Eŭropo—en la daŭra kontrolo al la Germana nacio. Simile opinias nia Juda korespondanto. Ĉi tiu sinteno ne bezonas klarigon; la faktoj en la proksima pasinteco parolas lingvon ne miskompreneblan.

De Aŭstro loĝanta en Germanujo ni ricevis leteron en kiu li plendas, ke ni forlasis la neŭtralecon kaj ekiras sur la politikan terenon. Laŭ li, ni eĉ devus ne tuŝi ĉi tiun problemon, ĉar nia movado estas pure lingva, kaj ne partopreni en politikaj diskutoj. Kiel protesto pro nia sinteno (t.e., pro tio, ke ni diskutigas ĉi tiun aferon publike) li minacas ekŝigi el U.E.A.

Kia nun devas esti *nia* sinteno? Ni forlasu ĉian antaŭjuĝon kaj ni penu pensi realisme. Ni, t.e. nia movado, neniel povas ludi la rolon de Salomono kaj juĝi pri historiaj okazaĵoj ne kaŭzitaĵoj de ni, kaj pri ties sekvoj, kiujn ni ne povas influi. Ne, nia vojo devas esti alia.

Kiel unuan principon ni jam proklamis kaj neniu kontraŭstaras tion: U.E.A. ne akceptas kiel individuan membron aŭ kiel Delegiton personon, kiu aktive kunlaboris kun la Nazi-reĝimo. La procedo laŭ kiu ni konstatas ĉi tiun aktivan partoprenon estas fiksita.

Kiel dua principo, ni opinias ke en ĝenerala maniero, ĉiuj Esperantistoj en Germanujo — Judoj kaj Germanoj — kiuj suferis pro la reĝimo, kiuj vegetis kiel *gastoj* en koncentrejo, estas niaj fratoj. Ilia nombro estas atentinda. Multaj el ili aliĝis al la *subtera* agado kontraŭreĝima. Antaŭ ili ni ĉiuj demetu la ĉapelon!

Kiel trian principon ni proponas ke ni simple akceptu la silentulojn, kiuj pro multaj kaj diversaj kialoj ne povis esti *herooj* aŭ *martiroj*.

Pli kaj pli vidiĝas, ke la Germana problemo fariĝos centra disputobjekto politika. Nin gvidas sole kaj nure la demando pri la estonteco. Post dek jaroj oni juĝus nin severe se ni lasus nin gvidi de sentimentoj, ne ekzamenintaj la veran situacion. Oni jam atentigas nin, kia estus la sinteno de Germanaj Esperantistoj se la nazianoj estus venkintaj. Nu tio estas psikologia problemo kiun ni ne kapablas respondi absolute, kiel ankaŭ ĉiujn ceterajn *se*-demandojn. Oni povus kunigi dekojn da argumentoj kiuj pledas *por* nia supre skizita sinteno. Kion ni ja antaŭdiras ĉi tie estas: iam la nova Germanujo, ekestiĝanta el la ruinoj, sango kaj larmoj, denove ludos gravan rolon, alian ol tiu, kiun ni devis sperti. Tiam nia ideo trovos grundon pli favoran ol iam. Por kunhelpi al tio, ni ideaj kosmopolitanoj kunhelpu per klara percepto kaj firma decido.

Nia 33-a Kongreso en Malmö donos al ni indikon kaj gvidon pri ĉi tiu afero!

H.J.

Sur paĝo 157 nia redaktoro parolis pri Brit-Usona alianco. S-ro Bernard Long atentigas, ke tio ne estas tute ĝusta. Britujo kaj Usono ne havas aliancon. La redaktoro sjaflanke rimarkigas, ke li opiniis idean kunligon alianco; alivorte idekomunecon de la du ŝtatoj. Kontraŭe, Britujo kaj Sovet-Unio faris formalan aliancon. (Red.)

Georges Agricola :

UNUIGITAJ NACIOJ KAJ HOMRAJTOJ

En Decembro pasinta finiĝis en Ĝenevo kunveno de la *Komisiono por la homaj rajtoj* de la Unuigitaj Nacioj. La tasko de ĉi tiu komisiono estis, studi la nunan aspekton de la homrajtoj kaj ekzameni proponojn por plibonigi kaj plilarĝigi ideon kaj aplikon. Ankaŭ en ĉi tiu diskutado la opinioj profunde diferenciĝis. La Sovet-Unio, kun apogo de Ukraino, Blankrusujo kaj Jugoslavujo, defendis la vidpunkton ke unue devus esti ellaborita projekto de *Deklaro pri la homrajtoj*. De tiam nuliĝis la espero, ke la Sovet-Unio kaj la apogantaj ŝtatoj estus pretaj subskribi *Konvencion pri la homrajtoj*. Projekto de tia konvencio, submetita al la kunveno, estis konsiderata flanke de la cititaj ŝtatoj, kiel tro frua. Resume, ĉio estas ŝvebanta, la studoj daŭras. La demando estas, ĉu U.N. (la organizo de la unuigitaj nacioj) iam havos la povon devigi ŝtaton respekti la homrajtojn. En konkreta maniero ni citu ekzemplon de la proksima pasinteco: la persekutado de la judoj kaj reĝim-kontraŭuloj en la Tria Regno. Ĉu en tia kazo la organizaĵo povus interveni? La kerno de la problemo estas nenio alia ol la limigo de la suvereneco de ŝtato! Aŭstralio defendis per sia reprezentanto la kreon de internacia tribunalo por la homrajtoj. Ĉi tiun proponon la Soveta delegito opiniis kiel *danĝeran kaj fantazian planon, indan je romano de H. G. Wells*. Tute objekte, sen particeco, la starpunkto de la supre cititaj ŝtatoj respondas al realeco. Ĉia interŝtata reguligo de konfliktoj signifas nenion alian ol limigon de la propra suvereneco kaj juran rajtigon por ekstera organismo, ekzameni okazantaĵojn en kiu ajn ŝtato.

La komisiono tamen faris utilan laboron. Ĝi ellaboris projekton pri deklaro de la homrajtoj, plie proponojn pri la plenumado. La tuta laboraĵo estis sendata al la membroŝtatoj de U.N. komence de 1948. La koncernaj registaroj povos sendi proponojn pri ŝanĝoj kaj modifoj ĝis Aprilo 1948. Ankaŭ ŝtatoj, nemembroj de U.N. povos, laŭ peto, partopreni en ĉi tiu prijuĝo. Sur la bazo de la ricevitaj respondoj redakcia komisiono ekzamenos, ĉu novaj projektoj devos esti ellaborataj aŭ ne. Poste kunvenos la *Komisiono por la homrajtoj* por fiksi la definitivajn projektojn, submetotajn al la ĝenerala kunveno de U.N. venontan aŭtunon. Oni atendas, ke ĉi tiu kunveno akceptos la deklaron pri la homrajtoj kun rekomendo.

Utilas koni la ĉefajn erojn de la nova deklaro pri homrajtoj. Kelkaj enkondukaj artikoloj antaŭas la projekton.

“Ĉiuj homoj estas libere naskitaj, egalaj je digno kaj rajto. La naturo ilin provizis je prudento kaj konscienco kaj ĉiu devas agi frate kontraŭ kunhomo.” (La reprezentanto de la Sovet-Unio opiniis, ke ĉi tiu artikolo videble portas la signon de la materialisma filozofio de la 18-a jarcento).

“Ĉiu homo havas rajton je sia vivo, sia libereco kaj sekureco de sia persono. Neniu povas esti arestata aŭ gardata en aresto sen leĝa bazo. Ĉiu individuo havas la rajton determini per sendependaj kaj senpartiecaj tribunaloj siajn rajtojn kaj devojn. Ĉiu havas la rajton de leĝa protekto kontraŭ atakoj al lia reputacio, lia vivo kaj tiu de lia familio. Ĉiu havas la rajton cirkuladi en sia hejmlando, libere elekti sian restadlokon kaj akcepti alian naciecon. Ĉiu rajtas serĉi rifuĝon kaj ricevi ĝin okaze de persekuto.”

Sekvas la problemo de la civilaj rajtoj fundamentaj.

“Ĉiu individuo ĉie posedas leĝan personecon kaj ĝuas la fundamentajn civilajn rajtojn. Ĉiu individuo rajtas je sia nacieco. Neniu fremdulo, akceptita laŭleĝe, povas esti forpelita el lando antaŭ ol esti aŭskultita.” (Ĉi tio estas du novaj kaj tre gravaj juraj pensoj).

Kaj la deklaro daŭrigas per la listo de la publikaj liberoj, la liberoj de konscienco, kredo kaj kulto, libero pri kunvenoj kaj asociiĝo, la rajto de libera defendo de sia opinio, parole kaj skribe. Plie, la rajto fari petskribon, ankaŭ al la adreso de la Unuigitaj Nacioj; la rajto rezisti kontraŭ sistema subpremo aŭ tiraneco. (Ĉi tiu lasta artikolo devis esti forigata je postulo de la Soveta delegito, kiu trovis la redaktadon nepreciza).

La fino de la deklaro estas katalogo tre ampleksa, pri sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj homrajtoj; nome, la rajto de laboro je kompenso konforma al la kapablo kaj la klopodo kaj je konvenaj laborkondiĉoj, la rajto aliĝi al sindikato, rajto je senpaga kaj deviga elementa eduko, allaso al superaj studoj laŭ la ebloj de la koncernata ŝtato, je ripozo sen depreno de laborpago, je protekto de la sano per sufiĉa nutrado, vestigo kaj kuracista traktado. Kaj fine la rajto de la naciaj malplimulto (minoritatoj) je la propraj lingvo, lernejoj kaj kulturaj instalaĵoj.

Tio formas imponan liston de homrajtoj. Iuj estas nenio alia ol konfirmo de jam ekzistantaj kaj ĝenerale aprobitaj ideoj. Aliaj estas komencoj por nova evoluo. Kiel tuto la nova deklaro estas

vojmontrilo por la estonteco. Ĝi ne estas spegulo de la nuntempa praktikado. Homoj, kiel ankaŭ ŝtatoj, bezonas profundan kulturelvolviĝon antaŭ ol la montritaj homrajtoj fariĝos universala realaĵo. La Ĉina delegito opiniis, ke ĉi tiu deklaro celas efektiviĝi la postulon de Konfucio *Ne faru ion al aliulo, kion vi ne dezirus ke oni faru al vi*, variaĵon de la admono de Tobit al Tobio *Nenion faru al iu, kio estus malagraba al vi* (*Apokrifa libro Tobio*, 4.15).

Por tion respekti kaj respektigi estas, kiel ĉiu spertas ĉiutage, neniel facila.

Internacia konkurso por la junularo

Por la kvina fojo okazas ĉi tiu konkurso danke al donaco kaj fondaĵo de S-ino Anna F. G. van Loan (Usono). La konkurso estas protektata de la *Tutmonda Ligo por la Amikeco inter la eklezioj* kaj de la *Junular-sekcio de la Ekumena konsilantaro de la eklezioj*.

La ĝenerala temo estas: *Kristo kaj la universala frateco*. Konkurspartoprenantoj devas trakti la temon laŭ la jena skemo:

- (a) Junuloj: Kion diras la Biblio pri la universala frateco?
- (b) Pliaguloj: Estante juna kristano, kian agon konkretan mi devas plenumi hodiaŭ por la paco?

Multaj premioj estas donotaj, inkluzive de unua premio por *pliaĝuloj* (aĝmaksimumo 21 jaroj) de mil svisaj frankoj por vojaĝo eksterlande. Aĝmaksimumo de *junuloj* estas 17 jaroj je 31-a de Decembro 1947.

Oni akceptas verkaĵojn sen distingo pri sekso, raso, lingvo (inkluzive de Esperanto). Inter la juĝantoj troviĝas amikoj de Esperanto kaj la redaktoro de *Esperanto*. Skribu al: S-ro Th. de Felice, 37 Quai Wilson, Genève, Svisujo.

Kooperativismo

La internacia kooperativa alianco, 14 Great Smith Street, London, S.W.1, Anglujo, promesis premion de 100 anglaj pundoj por la plej bona solvo de la tasko: *Kio povas progresigi nacian kaj internacian kooperativismon?* La partoprenantoj mem decidis la amplekson kaj lingvon de la respondo, kiu estu ĉe la nomita adreso antaŭ la 30-a de Aprilo 1948 en rekomendita letero. La rezulto estos komunikata dum la internacia kooperativa kongreso en Praha en aŭtuno 1948. Jen bona okazo propagandi samtempe Esperanton kaj kooperativismon.

P. Thorsen.

Rajtoj de la homo

Nerezigneblaj rajtoj de la homo estas: fariĝi kiu li estas; la rajto de maturiĝo interna kaj ekstera; la rajto sin formi persono, kiu posedas vizaĝon kaj nomon. Tiuj estas ankaŭ la denaskaj rajtoj de vivo kaj sano, pri liberaj kredo kaj konscienco, pri edzeco kaj familio, pri laboro kaj partopreno en la bonoj teraj, la rajtoj kiuj radikas en la *natura* moralo kaj rangiĝas antaŭ la ŝtata leĝaro; rajtoj pri digno kaj libero, kiuj emfazas tial, ke Dio kreis la homon laŭ si mem.

Ili estas rajtoj pri kiuj la homo oftege lasas sin trompi, pri kiuj li mem tro ofte trompas sin. Estas homrajtoj, kiujn li facile malpostulis kiam li persvadiĝis senpere deveni de la simio, kiam li lasis al si *science pruvi* ke li estas nur rezulto de heredo kaj cirkonstancoj.

Estas rajtoj de la homo, kiujn li lasis al si maldoni de diigita unuopulo aŭ de diigita amaso, kiujn li oferis al totalitarismo, kiu ne plu lasis al li ion kio de libero kaj digno distingus la homon. Tiel li fariĝis voĉdonilo kaj furaĝo de kanonoj, materialo el homoj, numero kaj akto; tiel li fariĝis aŭtomato kaj roboto.

Ĉiu kiu atingis la uzon de la racio scias, ke li estas vermo mizera, kiu eble rajtas kurbiĝi sub dispremado, ke la rajtoj de la homo statas malbone tie kie iu diktatoras, kie fekundas malliberejoj, koncentrejoj, sekreta polico, spionado, denuncoj, cenzuro, demandaroj k.s.

Sed ne sufiĉas fari batalvokon el vortoj *libero, egalo, frateco*. Ĉi tiujn ideojn, ĉi tiujn rajtojn, kiuj samtempe estas devoj, oni devas kompreni en ilia esenco. La homo maturiĝu en ili. Libero ne estas la *rajto* enkarcerigi la *aliulon*, kiel idioto iam deklaris dum esplorado. Libero kreskas el sinrego, ĝi estas unue kaj ĉefe libero *interna*, anima.

Egaleco ne estas la rajto, adapti ĉiujn, kiuj estas pli bonaj kaj pli saĝaj ol mi, al mia malpli granda mezuro, senkapigi ĉion eminentan.

Frateco ne estas la rajto forpreni de aliaj tion kio plaĉas al mi laŭ kia ajn regulo.

Egaleco de ĉiuj antaŭ ĵusta leĝo kaj, pli ol frateco, amo al la proksimulo en la senco de la prediko surmonta povus alvenigi la pacon. Kiu sin faras vera homo, tiu en la homrajtoj trovas ion pli bonan ol modan parolon por la ĉiutago. La homo ne ekzistas por la maŝino, por la ŝtato, por la diktatoro, por la partio, por la amaso, por la mondo. Ĉio ĉi tio ekzistas por la homo, por ke li plenumu sian Disimilecon.

Robert Skorpil.

Trad. D-ro Halbedl.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Grava Paŝo de Aŭstra Poŝtdirektoro

Ĝeneral-Poŝtdirektoro D-ro Karl Dworschak, Vicprezidanto de ILEPTT, dissendis cirkuleran leteron al Poŝtdirektoroj en pluraj landoj, por instigi ilin enkonduki Esperanton en la poŝta trafiko, kaj por peti ilin pri ilia sinteno rilate al la tuta problemo.

Belgujo

Okaze de la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, la belga radio aranĝis kvinminutan elsendon pri Esperanto. Pro teknikaj kaŭzoj la dissendo okazis la 16-an de Decembro. Oni komence aŭdigis *La Espero*. Poste per tre favoraj vortoj, S-ro Philippet enkondukis interparoladon kun D-ro Kempeneers, Prezidanto de Belga Ligo Esperantista, kiu per kelkaj frazoj skizis la nuna staton de la movado.

La elsendo vekis grandan intereson ĉe la publiko.

Dana Esperanto-filmo

Dana Ministerio por eksterlandaj aferoj informis al Dana Esperantista Komun-Komitato la 29-an de Novembro, ke oni esploros la eblojn provizi filmon pri Danujo kun teksto en Esperanto. Informpetojn, dankleterojn, antaŭmendojn, proponojn pri interŝanĝo de filmoj sendu al prezidanto de D.E.K., Poul Thorsen, Bangertsgade 8, IV, N. Kopenhago, kiu poste ĉion prezentos al la ministerio.

Egiptujo

Okaze de la Zamenhofa Tago D-ro Tadros Megalli, Ĉefdelegito en Egiptujo, faris prelegon en araba lingvo pri la vivo de Zamenhof antaŭ kunveno de la Y.M.C.A. en Cairo. Poste S-ro Perez franclingve legis kelkajn eldirojn de D-ro Zamenhof kaj S-ro Megalli donis provlecionon. Ĉeestis 50 personoj, kaj preskaŭ ĉiuj sin anoncis por la nova kurso, kiu sekvis. La Sekretario de la Y.M.C.A. — kun 2000 membroj — tre favoras Esperanton.

T.M.

Ekspozicio en Parizo

Esperanto, dua lingvo de la moderna homaro

Ĉi tiu ekspozicio okazis en Parizo en la Pedagogia Muzeo dum Oktobro-Novembro 1947. Ĝin organizis la Estraro de tiu Muzeo kaj la Ligo *France Esperanto*, fondita de F-ino Huguette Royer. Ĝi estis inaŭgurita de S-ro Ciosi, Sekretariejstro de S-ro Naegelen, Ministro pri Nacia Edukado.

Tiu prezentado elmontris milojn da libroj kaj dokumentoj. La Komerca Ĉambro en Parizo pruntedonis la bibliotekon de la antaŭa *Centra*

Oficejo (Ĝeneralo Sebert). Aliaj dokumentoj estis senditaj el Francujo, Britujo, Nederlando... La Pariza Urbeŝtraro pruntedonis 40 standardojn el ĉiuj landoj.

Profesoro Aymonier prezentis tiun belan kaj imponan elmontraĵon, kiu ricevis viziton de distingindaj personoj, inter ili ĵurnalistoj el diversaj landoj, delegito de la oficiala Franca Radio, anoj de UNESCO, eminentuloj el pedagogiaj institucioj. Por multaj laikuloj tio estis kvazaŭ malvualigo.

Okaze de tiu manifestacio Profesoro Cotton, Ĝeneralo Bastien, ĵurnalista Remond kaj F-ino Huguette Royer partoprenis radio-disaŭdigon.

S-ro Lebrun, la eminenta direktoro de la Pedagogia Muzeo, helpis ĉiumaniere. Li publikigis raporton en la Revuo *Nacia Edukado* kaj mendis dek kolektojn da fotografiaĵoj de la Ekspozicio por la oficialaj albumoj kaj por la eminentaj vizitontoj. La Ligo *France Esperanto* jam ricevis invitojn de gravaj organizoj, kaj verŝajne estiĝos interesaj sekvoj de tiu manifestacio.

Esperanto en oficialaj bibliotekoj

La Direktoro de la Pedagogia Muzeo en Parizo sciigas, ke li danke akceptos ĉiun verkon pri aŭ en Esperanto por la Centra Biblioteko de la Ministerio pri Nacia Edukado, kiu jam ricevis la belan bibliotekon de nia pioniro Célestin Rousseau. Plie, en tiu Ministerio ekzistas rondiranta Biblioteko destinita al la instruistoj. Tre grave estus, ke tiuj Bibliotekoj enhavu riĉan Esperantan libraron.

Aliflanke, la Pariza Komerca Ĉambro disponigas sian Bibliotekon al ĉiuj Esperantistoj. Sed post 1920 ĝi ne pliriĉiĝis; ĝi deziras ricevi verkojn eldonitajn post tiu dato.

Eldonantoj, Asocioj, Samideanoj bonvolu helpi al tiuj Bibliotekoj sendante, se eble:

Du ekzemplerojn al la *Musée Pédagogique*, 29 rue d'Ulm, Paris V.

Unu ekzempleron al la *Chambre de Commerce de Paris*, 27 avenue de Friedland, Paris VIII.

Hungarujo

Pli ol 700 Esperantistoj kaj amikoj de Esperanto plenigis la plej elegantan filmteatron de Budapeŝto la 14-an Decembro okaze de jubilea Zamenhofa Festo. Post malferma parolo de ŝtatestretario Vasady-Kovács prezidanto de H.E.S., la urbestro de Budapeŝto, S-ro Jozefo Bognár salutis la publikon. Li klarigis, ke la uzo de la latina lingvo dum mezepoko ebligis internaciajn interrilatojn nur por esceptitaj instruistoj, sed Esperanto estas la lingvo de la

demokrata homaro kaj en tiu rolo ĝi devas venki kune kun la demokratio.

Julio Baghy faris Esperantan festparoladon, K. Kalocsay prezentis sian plej novan poemon, baladon pri Zamenhof. Deklamis aktorino E. Móra, poeto L. Tárkony, kantojn prezentis L. Halmi kaj la populara M. Sárosi. La kantistaro *Magyarság* prezentis la himnojn kaj laboristan kanton. Post parolado de vicprezidanto I. Csurgai oni prezentis la filmon jam plurloke viditan eksterlande, pri la rekonstruo de Budapeŝto.

En la sama tago oni anoncis, ke la instruada ministerio pretigas dekretan pri Esperanta instruado kiel nedeviga fako en ĉiuj mezlernejoj.

La revuo *Uj Magyarország* donis en sia kristnaska numero sur tuta paĝo la lastajn kvar lecionojn de kurso en formo de dialogo.

Japanujo

En la pasinta aŭtuno, la unuan fojon post la milito, oni komencis agadon en Osaka. S-ro Kiyosi Ikegawa raportas, ke jam ekzistas en tiu urbo societo kun 200 membroj kaj tiu estas la plej granda grupo en Japanujo. Oni instruas Esperanton en la Komerca Universitato de Osaka kaj en la Ekonomia Kolegio.

Polujo

La 4-an kaj 5-an de Oktobro okazis en Varsovio la Dua Ĝeneralpola Kongreso de Esperantistoj kun ĉeesto de Vicministro de klerigo S-ro Wilhelm Garnarczyk, kiu dum la solena malfermo salutis kiel Esperantisto la kongreson oficiale en la nomo de la Ministerio de Klerigo.

Tezo de Prof. M. Sygnarski *Vojoj al realigo de Esperanto en la nuna tempo* vekis grandan intereson kaj simpatian. Precipe entuziasmis lia aludo pri deziro ke Esperanto estu enkondukata en la programon de la Ministerio de Klerigo.

Vicministro Garnarczyk tiel serioze interesiĝis pri Esperanto, ke li aliĝis al la Asocio de Esperantistoj en Pollando pere de Grupo Varsovio, kaj oni antaŭ nelonge elektis lin prezidanto. Danke al lia klopodo, Prof. Sygnarski nun laboras ekskluzive por Esperanto gvidante ses kursojn en ŝtataj lernejoj, inter ili Pedagogia Liceo kun 60 kursanoj, kiuj lernas la lingvon preskaŭ devige. Tio estas senprecedenca en Polujo kaj signifas gravan paŝon antaŭen.

La Vicministro mem rakontis pri okazintaĵo dum la Esperanto-Tago en Gdansk en Aŭgusto. Vizitante la Foiron kun la Ministro de Klerigo, li atingis la Esperanto-standon. La ministro diris kun rideto, "Denove tiuj maniuloj!" La vicministro rediris, "S-ro Ministro, inter ili estas ankaŭ mi!"

Sekve de apatio aŭ aktiva kontraŭstaro flanke de polaj katolikaj instancoj, Prof. Sygnarski petis, kaj ricevis, aŭdiencon kun Lia Eminenca Moŝto Kardinalo Sapięha, kiu afable akceptis lin kaj bonvolis aŭskulti pri la praktika uzado de Esperanto en la katolika vivo.

Tute alie estis pri Pastro Jan Piwowarczyk, ĉefredaktoro de religia gazeto *Tygodnik Powszechny*, kiu estas malamiko de Esperanto. Tial ke en kelkaj numeroj aperis artikoloj aŭ aludoj malfavoraj al Esperanto, oni volis en intervjuo konvinki lin pri la malĝusteco de lia sinteno. Li tamen restas necedema, kaj esprimis la decidon, ke li ne volas presigi artikolon pri Esperanto ĉar ĝi ne meritas tion. Evidente jen estas tasko por katolikaj samideanoj. La adreso estas: ul. Wiŝlna, KRAKOW, Polujo.

Pola Ministerio promesas apogon

La Asocio de Esperantistoj en Pollando sendis al la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj rezolucion kun la peto, ke ĝi subtenu la penadojn de la Esperanto-movado ĉe UNO.

La Asocio ricevis la jenan respondon:

"Respondante la skribon de la 25.X.47 n-o 1741/47 la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj komunikas, ke ĝi ricevis la rezolucion de la II-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto en Varsovio.

Ĉe favoraj cirkonstancoj la Ministerio subtenos la peticion de la Universala Esperanto-Asocio sur tereno de U.N.O. kaj U.N.E.S.C.O."

Estas tre dezirinde, ke aliaj instancoj similmaniere klopodu ĉe sia ministerio por tiel krei favoran bazon de kunagado jam antaŭ la afero estos diskutata de la mondorganizaĵoj.

Sukceso en Pola gimnazio

Loka komerca gimnazio en Walbrzych, Polujo, starigis Esperantan kurson, kiun partoprenas 62 gimnazianoj. La kurso daŭras de la 1-a de Decembro, 1947.

Pacifismo kaj Esperanto

Fondiĝis en Vieno, Aŭstrujo, organizaĵo kun titolo *Verda Kongregacio*, kies tasko estas klopodi pri la pacifismo kune kun kaj pere de Esperanto. La organizaĵo entreprenas vastskalan propagandon sur la aŭstra tereno kaj organizas kursojn. Oni petas helpon ne en formo de mono, sed de varoj, manĝaĵoj, vestoj kaj simile. (*La redakcio denove atentigas, ke la plimulto de landoj en Eŭropo jam malpermesas la sendon eksterlanden de tiuj objektoj*)

La adreso de la *Verda Kongregacio* estas: Alfons Langen, Pfarrer in Ebenfurth, N.O., Aŭstrujo.

Dujara Restado en Germanujo postmilita

Dum la fruaj tagoj de la vintro de 1945 mi iris Germanujon kiel ano de la Britregistara instanco. En tiu tempo estis neeble konstati, ĉu la Esperanta movado ankoraŭ vivas en tiu lando. Mi deĵoris en vilaĝo 12 kilometrojn de Hamburg. La transportrimedoj estis ĥaosaj kaj la problemoj viziti la urbon estis malfacila. Fine mi trovis vojon, per la elektra Waldörfer-fervojo, kiun atingi oni devis marŝi trans kampojn distancon de du-tri kilometroj.

Iufoje, alveninte en la malgranda stacidomo Farmsen, mi subite rimarkis anonceton en kutima ligna kadro: *Wer sprach Esperanto?* Do, fine mi trovis postsignon de la antaŭa *civilizacio!* La adreso, kiun mi tie trovis kaj kiun mi skribis sur papereton, estis tiu de S-ro O. Bünemann. Plejble baldaŭ mi vizitis lin en Hamburg kaj ricevis informon pri la grupo en Hartungstrato.

Inter la anoj mi renkontis konaton S-ron Rudolf Meyer, kiun mi kontaktis antaŭ ok jaroj en Anglujo dum kunveno de Federacio de Lancashire kaj Cheshire en Liverpool. Du anglojn mi renkontis tie, S-rojn Harris kaj Pickard. Poste aniĝis du-tri danoj, kiuj laboris en la regiono de Hamburg.

Tiutempe la grupo estis malgranda kaj iom nevigla. S-ino Bünemann ĉiuĵaŭde laŭtleĝis per sia ĉarma voĉo ĉapitron el *La Fino* de Grafo Bernadotte. Por mi estis aparte interese aŭskulti germaninon legi tiun verkon antaŭ germanoj! Dum la somero ni daŭre renkontiĝis en la bela ĝardeno *Planten un Blomen* meze de la urbo. Oni okazigis ekskursojn, ekzemple al la Harburga Arbaro, Wohldorf ĉe la rivero Alster, kaj al Bad Oldesloe. Tie ni okazigis kunvenon de Esperantistoj el diversaj lokoj kaj estis nova sperto povi renkonti samideanojn post tiom da jaroj, inter ili junan hungaran ekssoldaton.

Post translokiĝo de nia renkontejo al restoracio en Kolonnaden, kies estro estis samideano, ni komencis la propagandon. Ni luis pramŝipon *Elbe* por fari ekskurson kun klubo *Geamikoj de la Naturo* kaj demonstris antaŭ ties membroj la praktikeblon de Esperanto.

En Oktobro 1947 ni okazigis grandan kunvenon, kiun partoprenis pli ol mil personoj. Nia dana samideano S-ro Ege multe helpis nin. Unu rezulto estis, ke ni ricevis tiom da novaj anoj, ke mankis sidlokoj en la klubejo! Jam ne 25-35 renkontiĝis, sed ĝis 65 homoj ĉiun ĵaŭdon! Oni devis disdividi la homojn en klasojn situantajn pli oportune por la lernantoj, kiuj venis el urbetoj ĉirkaŭe. Sed nun ĉio bone iras.

Dume mankas lernolibroj, vortaroj, eĉ papero kaj notlibroj por la gestudentoj. Nur ne mankas la bona volo kaj la deziro denove aparteni al la tutmonda familio, kiu estas — almenaŭ laŭ

germanaj sentoj—*ekstera*. La maloftaj kontaktoj, kiuj okazas, permesas iometan kunligiĝon kun tiu *ekstera* mondo. Ekzemple, kiam la svedaj samideanoj estis survoje al Bern por la Kongreso, ili bonvole avizis nin pri trapaso tra Hamburgo kaj ni amasiĝis en la stacidomo por ĝui tiun mallongan travivaĵon. Por la germanoj tio estis neforgesebla okazaĵo, ĉar multaj el ili unuafoje kontaktis la *eksteron*.

Multaj germanoj kredas, ke la *eksteruloj* havas malestimon senton pri ili. Mi mem ne scias, ĉu tio estas ĝusta aŭ ne. Mi supozas, ke la sento estas komprenebla, se ĝi ja ekzistas. Necesas tamen esprimi la fakton, ke la Esperanto-movado ne mortis en Germanujo, kaj la kaŭzo de tio estas la kuraĝaj homoj, kiuj ne hezitis spiti la naciistajn tendencojn, eĉ la malliberecon kaj la morton por subteni kaj konservi la ideon de Esperantismo en Germanujo. La ĉi tieaj samideanoj plejparte reprezentas la rezistantojn kontraŭ la Hitlerismo.

G. W. Keiller.

Dua Internacia Muzikfesto, Llangollen, Kimrujo

La ideo, ke Esperantistoj estas kontraŭnaciaj estas funde erara. Tion pruvas multaj manifestacioj nacikutimaj aŭ folkloraj, kiujn Esperantistoj partoprenis, propagandis kaj subtenis. Ni memoru nur pri la belaj *Floraj Ludoj*, Esperanta imito de kataluna (kaj alilanda) kutimo. Jen oni alvokas al partopreno en fama *Eisteddfod*, la Kimra muzikfesto, okazonta en Junio 1948 en Llangollen en la poeziriĉa lando de la bardoj. La organizantoj de ĉi tiu muzikfesto sin servas per Esperanto, kaj jam sin anoncis tri Esperantaj horoj. La komitato intencas interalie elekti eminentan Esperantiston kiel honoran vicprezidanton de la festo. Por utilaj informoj skribu al S-ino K. Rossetti, School House, Ponciau, Wrexham, Britujo.

Ni rimarkigu, ke Llangollen estas pentrinda urbeto kaj somerrestadejo en la Denbighshire'a valo de la Dee (Dyfrdwy) 9 mejlojn de Wrexham.

Sokol-Kongreso


Sokol, la potenca gimnastika organizaĵo ĉeĥo-slovaka, kiu preparas por la nuna jaro sian kongreson, uzas Esperanton por sia propagando.

Krom informaj bultenoj jam aperintaj oni nun preparas kelkajn tre plaĉajn Esperantajn eldonaĵojn, kiujn la Sokol-komitato dissendos senpage al ĉiu interesato. Tiujn eldonaĵojn ricevos ankaŭ ĉiuj Esperanto-klubo, kies adreson ni liveros. Vi faros bonan servon al via grupo kaj ni estos al vi dankaj, se vi sendos al ni kiel eble plej frue kompletan adreson de via grupo por ke ni povu transdoni al Sokol imponan nomaron.

*Esperanto-Asocio en ĈSR.,
Uralské nám 9, Praha XIX.*

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



*Sub La Verda Standardo

(Esperanto-instruo al infanoj laŭ la rekta metodo). Elementa kurso de P. Korte. Esperanto-eldonejo J. Mousses, Purmerend, Nederlando. Gvidilo 6 ŝil., Laborilo 2 ŝil., Memorigilo 1ŝ. 3p., plus afranko 10%.

Ĉi tiu verko de lerta pedagogo, kiu ne bezonas prezentadon en instruistaj rondoj, estas precipe bonvena ĉar ĝi forigas mankon kiu ekzistadis en la lernolibraro de nia lingvo. La metodo konsistas el tri partoj :

- (a) *Laborilo* : kiu estas la individua lernolibro por la infanoj. (Unua parto 20 lecionoj).
- (b) *Gvidilo* (por la instruisto) kiu enhavas ampleksajn notojn pri ĉiu el la 40 lecionoj.
- (c) *Memorigilo* : kiu estas privata kaj kuranta vortaro de la lecionoj laŭorde.

